

Heinrich Heine,  
Lorelay

*tradukita de Hans-  
Georg Kaiser*

Min kaptas malgaj' en  
la koro,  
pro kio tia trist'?  
Fabel' el antikva foro  
ne lasas de mi kun per-  
sist'.

Aere fridetas, trankvi-  
las,  
malhelas jam la Rejn'.  
La monto surpinte bri-  
las  
vespere en rava scen'.

Tre ĉarma feino sidas,  
jen supre por ador';  
la ora ornamo ridas;  
ŝi kombas harojn el or'.

Ŝi kombas per ora kom-  
bilo  
kaj kantas kun pasi';  
mirigas min la elbrilo  
kaj forto de l' melodi'.

...

Heinrich Heine,  
Lorelej

*tradukita de Ludwig  
Lazarus Zamenhof*

Ne scias mi, kial subita  
malgaj' en la koro na-  
skiĝis;  
el tempo jam enterigi-  
ta  
legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l'  
aero,  
la Rejno mallaŭte ba-  
bilas,  
per oro de l'sun' en  
vespero  
la supro de l' monto re-  
brilas.

Plej belan knabinon  
mi vidas:  
en ora ornamo brilan-  
te,  
sur supro de l' monto  
ŝi sidas,  
la harojn mistere kom-  
bante.

La oran kombilon ŝi  
movas  
kaj kantas tra l' pura  
aero,  
kaj forto mirinda sin  
trovas  
en tiu ĉi kant' de  
l'vespero.

...

Heinrich Heine,  
Lorelejo

*tradukita de Joachim  
Gießner*

Malgajon mi sentas en  
koro,  
sed kial tia tim'?  
Legendo el pratempa  
foro  
Vagadas tra mia anim'.

Jam fluas la Rejn' en  
malhelo,  
kaj malvarmetas l'  
aer'.  
Sed brilas la mont' en  
orbelo  
pro suna lum' de l' ves-  
per'.

Jen supre kabino pro-  
vokas  
per ora juvelar',  
kaj ŝia beleco allogas  
kaj ŝia ora harar'.

Ŝi kombas ĝin, kantas  
sorĉige,  
sirene kantas ŝi  
per neimagebla, mirige  
potenca melodi'.

...

Heinrich Heine,  
Lurleia

*tradukita de N. N. 01*

Ignoro, quid id sibi  
velit,  
Tristissimus cur sim,  
Antiqui aevi fabel-  
lam  
Cur saepe volverim.

Vesperascit et friges-  
cit,  
Et Rhenus leniter it,  
Cacumen montis lu-  
cescit,  
Dum Phoebus occi-  
dit.

Sedet in summo  
montis  
Virgo pulcherrima,  
Auro nitet gemma  
frontis,  
Se pectit auricoma.

Aureolo pectine pec-  
tit,  
Carmen canens pro-  
cul,  
Mirandum id habet  
modum  
Nec non virilem si-  
mul.

...

Ŝipisto ŝipeton gvidas, lin kaptas ve' de ek- zalt'.	Ŝipet' iras sur la rive- ro, ŝipisto ekstremis de l' kanto,	Ŝipiston en eta boato Turmentas koremoci'.	In cymba navitam mille
Li ja la rifojn ne vidas', li vidas nur supren sen halt'.	kaj blinda por ĉiu danĝero	Ne ĝenas lin rifo- kaskado,	Angores feri tenent, Non videt scopulos ille,
	rigardas li al la kantan- to.	rigardas nur supren al ŝi!	Ocli non si sursum vident.

Mi kredas, ke ondoj ti- ras	Ha, baldaŭ ŝipisto la bela	Ĝis tiras kun si al Rejn-fundo	Opinor undas de- vorare
la ŝipon funden de l' Rejn';	perdiĝis sub l' akvo- turnado;	la ondoj lin kun boat'.	Nautam cum navicu- la,
kaj tio de l' kant' eliras de Lorelaj-siren'.	ĝin Lorelej' faris krue- la, per sia mirinda kanta- do.	Nun kuŝas li en la pro- fundo pro Loreleja kantad'.	Effecit solo canendo Lurleia id dea.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

Arg-2-564 (2005-02-03  
19:18:09)

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazarus Zamenhofo, \*1859-12-15 - †1917-04-14).*

Arg-2-565 (2009-10-30  
16:15:09)

*Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Lorelej.html>.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 - †2003-11-25).*

Arg-2-1115 (2010-09-15  
12:51:51)

*Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kant-kolekto "Mia kantaro I", eldonita de Josef Schiffer (Wilstorferstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: [Josef.Schiffer@t-online.de](mailto:Josef.Schiffer@t-online.de)), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo "Fervoja Esperantisto" de Germana Ferjojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo 3.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en la Latinan de N. N. 01.*

Arg-2-179 (2010-02-11  
14:00:52)